

ESPERANTO

TRIUMFONTA

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto, Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto, București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikkonduktoro, Kaunas.

N-o 149 a
3. 8. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanoni (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.
Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas aldona al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.


Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Parolado de la ŝtata sekretario Schulz

Reprezentanto de la Prezidanto de la Germana Respubliko (Malferma Kunsido, 2. Aŭgusto).

Tre estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, mi ricevis la honorigan taskon saluti la XV-an Universalan Kongreson de Esperanto en la nomo de Sinjoro la Prezidanto de la Germana Respubliko kaj en la nomo de la Regna Ministerio de la Interno kaj transdoni al vi la plej bonajn dezirojn por bona ŝanco. Bedaŭrinde mi nur estas platona amiko de Esperanto kaj pro tio ne povas fari miajn salutparolojn en tiu ĉi lingvo tuj komprenata de ĉiuj ĉeestantoj al tiu kunveno. Sed tiu persona manko enhavas eble iom da bono por tio, ke la valoro kaj la signifo de Esperanto estas montrataj per evidenta ekzemplo, almenaŭ negativa. Sinjorinoj kaj sinjoroj, kiel ĉio nova kaj samtempe kuraĝega en la mondo Esperanto devas kontraŭbatali al multaj malfacilaĵoj kaj malhelpoj. Sed kredeble estas bone, ke ĉio nova devas superi malfacilaĵojn kaj kontraŭaĵojn, alie la mondo tro plena de malklaraj kaj nematuraj projektoj neniam trankviligus. Novaj projektoj kaj ideoj devas pruvi sian forton per tio, ke ili superas tiajn kontraŭaĵojn, kaj se ili ne havas tiun ĉi kapablon, ili devas malaperi aŭ ili reaperos en pli malfrua tempo. Ŝajnas al mi, ke la monda helplingvo Esperanto sukcesplene estas lasinta post si la unuajn malfacilaĵojn de tia komenco kaj ke ĝi per tio estas pruvinta, ke en ĝi vivas la necesa interna forto, kaj ke ĝi estas montrinta sian signifon por la estonto. Pro tio vi ne plu bezonas esti indulga al tiu grupo de kontraŭuloj, kiu estas kontraŭ vi, ĉar via afero estas nova kaj malhelpas ilian oportunemon. Sed la internacia helplingvo ankaŭ havas aliajn kontraŭulojn, personojn, kiuj principe estas amikoj de la nova, sed kiuj pro seriozaj kialoj objektivaj kredas devi kontraŭstari al vi. Se estus tiel, kiel diras tiaspecaj kontraŭuloj, ke la protektado de Esperanto okazus je kostoj de la propre gepatra lingvo, tiam mi nek persone, nek oficiale eĉ fingron nur movetus, kaj vi ĉiuj versajne ankaŭ ne. (Alvoko: Tre prave!) La gepatra lingvo estas unu el la plej noblaj havaĵoj de l' homo (aplaŭdo) kaj ĝi estas la plej grava ilo, per kiu la homo fariĝas homo kaj per kiu li kontaktiĝas al la homa socio. La gepatra lingvo enhavas tiom multajn valorojn kulturajn kaj esencajn, ke ĝi devas esti ŝirmata kontraŭ ĉiu malutilo; sed kiel nefakulo mi kredas povu esprimi la opinion, ke bona protektado de Esperanto eĉ premias bonan konon kaj scipovon de la gepatra lingvo. (Tre prave!) tiel, ke Esperanto kaj gepatra lingvo ne plu ŝajnas esti kontraŭuloj. Ekzistas aliaj kontraŭuloj de Esperanto, kredantaj, ke la zorgado pri la fremdlingvoj estus domagigata per akcelado de Esperanto. Ankaŭ tion mi bedaŭras eksterordinare kaj se tio estus fakte, mi ekzamenus, ĉu mi, konsiderante eĉ ĉiujn avantaĝojn de Esperanto, disponigus al vi mian helpon, ĉar la zorgado pri eĉ nur unu fremdlingvo havas nemezureblan valoron por la homoj ĵan pro la propra gepatra lingvo, al kies valoro kaj beleco oni ĝuste aŭ pli bone konatiĝas en komparo al alia. La studo de vivanta lingvo ankaŭ havas grandan valoron por la enpenetro en la spiriton de fremdaj popoloj, de fremdaj kulturoj, de fremdaj literaturo kaj arto; sed ŝajnas al mi kiel nefakulo, ke la protektado de Esperanto ne malutilas al la akcelo de vivanta lingvo, ankaŭ ne al unu el la antikvaj lingvoj, ĉar Esperanto, se mi komprenis ĝuste vian klarigon, ne intencas bari la vojon al la vivantaj aŭtohtonaj lingvoj kune kun la popoloj kaj ilia kulturo, sed ĝi volas esti super ĉiuj aliaj interesoj teknika helpilo, kia en la nuna epoko de l' monda trafiko, de ekonomia kulturo, de politikaj kaj socialaj rilatoj de la popoloj entute kaj de la naciaj unuope ne sole estas dezirinda, sed eĉ necesa. (Tre prave!)

La lernado de vivanta lingvo ja malfermas al mi la pordon al tiu lingvo kaj la teritorio propra al ĝi, sed ĝi ne samtempe donas la eblecon de interkompre-



D-ro Luppe, ĉefurbestro de Nürnberg.

Parolado de la ĉefurbestro.

Tre estimataj gesinjoroj, geesperantistoj!
El ĉiuj partoj de la mondo vi rapidis al Nürnberg por ideala afero, por akceli la grandiozan ideon de mondhelplingvo, kiu celas plifaciligon de merkato kaj trafiko, la ebligon de pli bona kaj pli rapida kompreno de fremda kulturo, kiu celas fine la alproksimiĝon de tutmondaj popoloj al paca konkuro, al reciproka indulgemo kaj interkompreniĝo.
En via ĉijara kongresurbo Nürnberg ekzistas plena kompreno kaj vigla intereso por via granda verko. La malnova komercurbo, kiu estis iam unu el la centroj de internacia trafiko, la moderna industriurbo, kiu liveras ĉiutage konatajn kaj ŝatajn produktaĵojn, ĝi bone scias, kion signifas facila interkompreniĝo por la mondtrafiko. En ĝiaj polklerigaj kursoj, ĉe la Komerca Altlernejo, ĉe la Popola Altlernejo estas Esperanto instruata kaj lernata de multaj, dank' al la nelaca propagando de ĝiaj anoj.
Tial la urbo Nürnberg kaj ĝia urbkonsilantaro plej kore bonvenigas vian kongreson en siaj muroj. Ni deziras vin, ke vi bone sentu vin en Nürnberg kaj gaudi la grandajn trezorojn de ĝia malnova kulturo, sed deziras ankaŭ al via kongreso plenan sukceson en intereso de la disvolviĝo de Esperanto kaj de ĝia alta graveco por mondtrafiko kaj interkompreniĝo de la popoloj.
nebleco trans tiuj limoj. Esperanto volas esti helpilo, per kiu oni per la helpo de la Esperantoparolantoj de ĉiuj popoloj de la tuta terglobo tuj kaj senpere povas interrilati kaj eĉ tiam, se mi ne scias alian lingvon krom mia propra gepatra lingvo. Kaj ĉar ankorau en ĉiuj landoj la granda popolamaso malhavas la nemezureblan avantaĝon kaj klerigan utilon de unu vivanta lingvo, Esperanto sekve de ĝia simpleco kaj facila lernebleco estas speciale valora interkompreniĝilo por la granda publiko. (Tre prave!)
La ideo de internacia helplingvo estas kuraĝega kaj ĝuste tiam, kiam ĝi fine laŭ konsiderinda mezuro konkeris al si la mondon, neniu pli ekzistos, kiu neos ĝian ekzistojon, kaj oni tiam ne plu povos kompreni la kontraŭecon de la pasintaj tempoj. Ĝis la principa akcepto de via granda kaj kuraĝega ideo vi devos ankorau batali, sed komence vi jam sukcesis gajni por via ideo kompetentajn rondojn, per-

sonojn kaj aŭtoritatojn. Laŭ kiu grado vi sukcesis tiurilate, tion ja vi povos taksu pli bone ol mi. Sufiĉu al vi, ke mi simple atentigas pri tio, ke la kompetenta Ministerio de la Interno, kiun reprezenti mi havas la honoron, sekvas al viaj klopodoj kun plena simpatio (Granda aplaŭdo) kaj ke ankorau aliaj aŭtoritatoj regnaj kaj germanistataj scias konsideri la signifon de Esperanto. Ankaŭ al tio mi povas ankorau atentigi, ke ĉiam pli kaj pli Esperanto estas enkondukata en la germanajn lernejojn kaj akcelata speciale en la ŝtato, kies gastameco vi ĝuas, kvankam ĝis nun nur fakultative. Sinjorinoj kaj sinjoroj, Esperanto estas, se mi ĝuste komprenis, simple ekstera teknika helpilo por interkompreniĝi sin reciproke. Mi kredas, ke estas bone, se via movado limiĝas konscie pri tio kaj gardas sian plenan neŭtralecon al ĉiuj lingvoj kaj popoloj kaj al naciaj sentimentoj kaj ĝuste per tio pravas sian laŭgecon kiel internacia helplingvo. Sed krom la ilo por la interkompreniĝo de la popoloj ekzistas ankorau aliaj necesaj premisoj por la interkonatiĝo de popoloj kaj samtempe por la starigo de reciprokaj rilatoj kaj por la interna kompreno, speciale en tempo, kiun ni nuntempe travivas, en tempo, en kiu kritiko kaj disputo disigis la popolojn kaj la internacia interkompreniĝado kaj kunlaboro estas malfaciligataj.

En tiu momento ŝajnas al mi ekstera helpilo, kia estas via movado Esperanta, ĵan pro tio esti subteninda kaj akcelinda, ĉar oni per ĝi povas esperi akcelon de la interpopola kompreniĝo kaj en pli malproksima estonto eventuale ankaŭ de la interpopola paciĝo, neoferte la popolecon de la unuopaj popoloj. Gltigante mian rigardon super tiun ĉi grandan kunvenon, en kiu anoj de nenombrelaj popoloj estas kunigitaj por paca kultur-laboro, mi kredas vidi je la horizonto trans la malhelo kaj la emociiga misero de la nuntempo etan sed promesplenan lumradion de pli bona estonto de la homaro. Kaj tiel mi finas mian paroladon kun la deziro, ke la XV-a Universala Kongreso de Esperanto, la dua sur germana teritorio, plenumu en tuta amplekso ĉiujn de vi atenditajn esperojn kaj havigu al via movado novajn fortojn internajn kaj eksterajn! (Grandega, vigla aplaŭdo.)
Stenografiita laŭ Stolze-Schrey kaj Esperantigita de Rob. Kreuz.

Unua Laborkunsido.

Precize je 9 h. la Prezidanto Prof. D-ro Dietterle malfermas la I-an Laborkunsidon, en ĉeesto de statistiksekretario s-o Schulz.
Okazas diversaj salutparoloj (i. a. s-o Isbrücker diras, ke li ricevis ankaŭ la reprezentantecon de la nederlanda ministro de komercio kaj industrio), kaj lego de telegramoj, i. a. de Internacia Laboroficejo Genève, de familio Zamenhof kaj de la Foiro Reichenberg.
Poste s-o Warden legas raporton de Lingva Komitato (vidu en la Kongreslibro!), kiu estas unuanime akceptata, kaj raporton de D-ro Privatoff la Akademij Konkursoj kaj Premioj. El 32 konkurstaj verkoj estas elektitaj 6, el kiuj estas premiitaj 2: „Idoj de Orfeo“ (de Bulthuis) kaj „Hermano kaj Doroteo“ (de Wüster).
La Prezidanto proponas sendi telegramon al la meritinta Prezidanto de la Akademio Prof. Cart. — Akceptata.
Nome de la bulgara registaro s-o Konsulo Kaufmann salutas la Kongreson. Li parolas germane, interpretas la konsuleja sekr. s-o Krestanoff, Li bedaŭras ke li ne venis akurate por erarkompreno, diras ke la bulgara registaro komisiis lin inviti la XVI-an Univ. Kongreson al Sofia, kaj finas per la vortoj: Vivu Esperanto! — La Kunsido aplaŭdegas.
S-o Dreßen salutas en la nomo de Sovetlanda Esp. Unuiĝo. Li diras, kvankam la koncepto de la sovetlandaj Esperantistoj estas alia, ili delegis lin por intertraki pri kunlaboro kun la cetera Esperantistaro. Proponas i. a., ke en Sovetlandoj la ĉ. 250 delegitoj de S. E. U. anstataŭu la (nuntempe nur 7) delegitojn de UEA.
La Prezidanto konsilas ke ĉiu pli bone informiĝu pri la Esp. organizo, ekz. pri K. R., K. K. K.,

